





VIZITO AL ĈINA LERNEJO

Ni alvenas al la dependa lernejo de la Instituto por lingvoj. El la larĝe malfermitaj fenestroj, dum tiu aŭtuna fino, falas la sonado de "Ĉu vi scias planti brasikojn?"

La direktorino akompanas nin. Ni pordfrapas. La kvardek lernantoj levigas kaj sonore ĵetkrias "Tago, Sinjor'". Sur la pupitroj, nek libroj, nek kraĵonoj, nek kajeroj. Super la podio, Prezidento Mao viglas.

Larĝaj skribaĵoj kun nigra-blankaj literoj kovras la malantaŭan muron: "Bonan studadon, bonan sanon, bonan laboron". Kun interplektitaj brakoj, saĝe kunigitaj piedoj sur la ŝtangeto, la pioniroj, kun ruĝa koltuko sur olivverda ĉemizo, atendas kaj aŭskultas.

Viglas ĉiuj vizaĝoj. Tie ne estas lernado sed instruado. La magnetofono elfluigas siam litanion, sekvante la bildprelegon. La aŭdvida muntaĵo estis tute konceptita kaj realigita de la instrukolektivo.

Dum la dekjara kulturrevolucio, neniam franca libro aperis en la ĉinaj lernejoj. Al studento reveninta el Francio oni konfiskis lian Larousse-vortaron (okcidenta infektado).

La studentoj el la franca sekcio ĝis nun ne rajtas eniri la bibliotekon de la instituto; nur la profesoroj havas la eblecon.

La atentaj vizaĝoj kaptas la hodiaŭan lecionon.

Kiu deziras paroli? demandas la instruistino; ĉiuj infanoj levas la manon. Kamaradon Ĉin kaj kamaradon Han elektas la instruistino.

Al ni restas nur foriri dirante ja kelkajn vortojn: "Ĝis revido, Sinjor'". Ni reenaŭtiĝas. El la etaĝo aŭdiĝas la unuaj sonoj de "Estis foje eta ŝipo".

El "Les Chinois de Shanghai" de Gérard Jaquet, tradukis A.B.

FASKO DA INFORMOJ

1. Kvarlanda renkontiĝo: de la 18-a ĝis la 20-a de aprilo 1986 en Villingen-Schwenningen, Nigra Arbaro FRG. Inf. BAVELO, Kolpingstr. 8 MESSKIRCH FRG.
2. Bibliã Sabat-Dimanĉo plilongigita: de la 1-a ĝis la 4-a de majo 1986 en la abatejo Grüssau, Bad Wimpfen, proksime al Heilbronn apud Stuttgart. Ni pri-traktos kaj meditos la evangelion laŭ Luko, kantos la psalmojn en Esperanto, kaj ĝojos pri la printempo en Nekar-valo. Negermanoj ĝuos la duonon de la prezojn. Inf. P. Eichkorn, Kolpingstr. 8 MESSKIRCH FRG.
3. Kiu ŝatas koni florojn? de la 19-a ĝis la 23-a de majo 1986 en Kultura Centro Esperantista La Chaux-de-Fonds Svislando. Matene: interŝanĝi spertojn pri flaŭroj, kompletigi nomenklaturon de sovaĝaj plantoj; posttagmeze viziti floriĉajn lokojn; vespere lumbildoj pri floroj. Inf. R.H. Bossong, Floraplein 23 JS EINDHOVEN Nederlando.

KORESPONDPETO: 24-jara katolika esperantisto senegalano deziras korespondi kun katolikoj laikoj aŭ religiuloj: S-ro Lazaro Koussandio DIAMACOUNE s/c Faty Insa, SÉNÉGAL-Equip B.P. 1097 DAKAR SÉNÉGAL.

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1985

<u>ENSPEZOJ</u>	!	<u>ELSPPEZOJ</u>		
Kotizoj	3 644,00	!	Bulteno	2 114,59
Donacoj	1 690,05	!	Kovertoj	343,94
Rentumo ŝparkaso	282,78	!	Informiloj	2 800,00
Deponoj ŝparkaso	440,00	!	Korespondado	509,85
		!	Vojaĝoj komitatanoj	270,00
		!	Diversaj	306,70
	<u>6 056,83</u>	!		<u>6 345,08</u>
En la kaso la 1/1/1985	8 130,48		Negativa saldo	288,25
En la kaso la 31/12/1985			<u>7 842,23</u>	



EL LA KULTURA ESPERANTO-DOMO GRESILLON 49150 BAUGE

KULTURAJ ARANĜOJ 1986

- I. A- PEDAGOGIA SEMINARIO organizita de U.F.E. didaktiko de lingvo-instruado, instruado specifa al Esperanto, metodoj. (29/3-2/4)
- B- INTERNACIA RENKONTO DE INFANOJ: kursoj, redaktado de staĝogazeto, promenadoj, ekskursoj, distraĵoj (30/3-5/4)
- II. INTERNACIA RENKONTO: libera programo, ekskursoj (15/6-29/6)
- III. PRELEGOJ kaj KURSOJ: konversacioj, ekskursoj, vesperoj (29/6-20/7)
- IV. KURSOJ: diversniveleaj, ekskursoj, distraĵaj vesperoj (21/7-10/8)
- V. A- INFORMATIKO kaj ESPERANTO-KURSOJ: ekskursoj (10/8-23/8)
- B- RENKONTO DE BLINDAJ kaj NE-BLINDAJ ESPERANTISTOJ: kursoj, trejnado al traduko, promenadoj, konversacioj (17/8-31/8)

+++++

FKEA-KONGRESO

RAJTIGILO (sendota al la sekretario v.p. 1)

Mi, subskribinto (nomo kaj voknomo)

ne povante partopreni la kongreson en Nantes, rajtigas reprezenti min, kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de FKEA.

Antaŭ la subskribo, bonvolu

Dato kaj subskribo:

skribi permane "Bon pour pouvoir"

+++++

VOĈDONILO

- 1. Ĉu vi aprobas la laboron faritan de FKEA? JES NE SINDETENO
- 2. Ĉu vi aprobas la finanĉan raporton? JES NE SINDETENO
- 3. Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj.

DEGRELLE Roger

PONS Roger

MARMOU René-Jean

VILLENEUVE Georges

+++++

INSTRUKCIOJ POR LA VOĈDONADO

Respondu la suprajn demandojn forstrekante la senutilaĵojn, enmetu la voĉdonilon (eventuale la rajtigilon) en koverton sen indiko. Enŝovu ĉi tiun koverton en alian, kiun vi sendu al la sekretario antaŭ la 30-a de aprilo. Dorse de tiu dua koverto, skribu vian nomon. Ne sendu alian aĵon, ĉar tiun koverton oni malfermos nur en Nantes, dum la kongreso!

+++++

LA KASISTINA ANGULO

Elkore mi dankas la anojn, kiuj jam en la fino de 1985 renovigis sian membrecon; ili grave helpis en la malgrandigo de la deficito (v. la finanĉan raporton sur p. 3). Dankon ankaŭ al tiuj, kiuj tion faris en la komenco de 1986; ili eĉ povis ricevi miajn novjarajn bondezirojn! Urĝan alvokon mi lanĉas al la ceteraj, ĉu ili aŭdos min? Ek al via ĉekaro, TUJ, ĉar morgaŭ vi forgesus...

ENHAVO

- 1.2. Bileto de la prezidanto
2. Preĝo de pura amo
3. Vizito al Ĉina lernejo  
Fasko da informoj  
Financa raporto
4. Jesuo-Kristo, fonto de vivo
5. El la Kultura Esperanto-Domo Grésillon  
FKEA-kongreso: rajtigilo, voĉdonilo  
Kasistina angulo
6. Kotiztabelo

KOTIZTABLELO 1986

IKUE kun "Espero Katolika" 80 F  
 Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

-----  
 ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo) 30 F  
 Geedza paro 40 F  
 Infano ĝis 16-jara, pastro, religiulo(in) 15 F  
 Bonfaranto 150 F  
 Dumviva membro 600 F

-----  
 UFE kun "Revue Française" 185 F  
 UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 190 F  
 Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

Dépôt légal: 1er trimestre 1986 !! Polycopié par l' A. C. F. E.  
 C.P.P.A.P. n° 62 532. !! Prieuré St-Martin  
 Directeur: René-Claude Colas !! La Houssaye-en-Brie  
 Directeur-délégué: !! 77610 FONTENAY TRESIGNY  
 René-Jean Marmou !! FRANCE